Dua jaro. — N° 7. Oktobro 1912.

# FERVOJA ESPERANTISTO

DUMONATA GAZETO

Organo de Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj

Jara abono : ₷ 1.
Unu N° : ₷ 0,2
Anoncoj : 1 paĝo : ₷ 5 ;
1/2 paĝo : ₷ 3 ;
1/4 paĝo : ₷ 2.

REDAKCIO
S-roj Berlande kaj G. Chilot
Administrantaj Redaktoroj
Sekretario : S-ro Alfred Petzold
Königstrasse, 4 III, Leipzig
(Germanujo)
(La Prezidanto de la Asocio rajte estas Direktoro de la gazeto).

Ĉiujn manuskriptojn, abonmendojn, anoncojn, k.t.p., adresu al S-ro Berlande aŭ al S-ro George Chilot, ambaŭ en *Villeneuve-St-Georges (Francujo)*.
La redakcio rezervas al si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn. — Artikolojn ne akceptitajn oni ne povas resendi.

## SCIIGOJ

DE LA

## Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj

**(Fondita la 7-an de Septembro 1909)**

Oficejo kaj Sekretario : S-ro Alfred Petzold, fervoja asistanto
4, III, Königstrasse, LEIPZIG (Germanujo).

## CIRKULERO N° 1

1) **Atentu !** En Krakovo oni decidis sendi cirkuleron al ĉiuj membroj, por ke ili sciu la aferojn koncernante nian Asocion. Se eble, ni ĉiam publikigos la cirkulerojn en nia gazeto. Membroj, kiuj ne abonas la gazeton, ricevos tiajn cirkulerojn aŭtografitajn (en intertempoj de duon- aŭ kvaronjaro).

2) **Oficejo kaj Sekretario** : vidu supre.

3) **Kasisto** (proponita) S-ro Joh. Engst, fervoja asistanto, 18, Klopstockstrasse, Dresden-Cotta. Li jam nun akceptas la kotizaĵon (₷ 0,500) por la Asocio.

La abonprezo de la gazeto nia estas sendota al la kasisto por la aferoj de gazeto.

Sekve, tiuj kiuj aliĝas nur al la Asocio, sendu ₷ 0,500 al S-ro Engst.

Tiuj kiuj :

1° nur abonas la gazeton, 1 ₷ ;

2° abonas la gazeton kaj aliĝas al la Asocio (₷ 1,500) sendu tiajn sumojn al S-ro George Chilot (adreso, vidu 4), kaj skribu samtempe al S-ro Engst per poŝtkarto, ke ili aliĝis al I. A. E. F., kiu tiele estos informata pri

la aliĝoj sen perulo. S-ro Chilot sendos al S-ro Engst la monon ricevitan por la I. A. E. F.

4) **Komitato de nia gazeto** : 1. S-ro Bontemps, 47, Villa de la Reine Henriette, à Colombes, près Paris ;

2. S-ro George Chilot, 54, rue de Paris, à Villeneuve-St-Georges, kiu estas sekretario kaj kasisto por la *aferoj de la gazeto*, kaj

3. S-ro Berlande, 4, rue Cottreau, à Villeneuve-St-Georges, kiu estas respondulo (gérant).

5) **Kunsidoj** de nia Asocio en Krakovo okaze de la VIII-a : ekstrakto de la protokolo (v. paĝo 51).

6) **Fervoja Esperantisto** : Ĝi estas nia oficiala bulteno kaj en ĝi aperos niaj cirkuleroj. La administracio estas plue en Paris kaj la gazeto nun aperos ĉiam regule ĉiudumonate. Mendoj rekte ĉe la administracio, se *nur* abono. Membriĝon kaj abonon oni anoncu al oficejo en Leipzig (adreso, vidu supre). La neregula apero de la gazeto ĝis nun estas kaŭzita pro personaj cirkonstancoj. Ni petas ĉiujn fervojistojn aboni nian gazeton.

7) **Estraro** (proponita en Krakovo) :

*a*) Prezidanto : S-ro reĝa fervoja diplom-inĝeniero P. Tarnow, 103, Pestalozzistr. Charlottenburg ;

*b*) Vicprezidanto : S-ro teknika supera sekretario E. Szijmanowski, 23, I, Werderstr. Bromberg ;

*c*) Kasisto : S-ro Engst (vidu supre) ;

*d*) Sekretario : S-ro Petzold (vidu supre).

Estas necese, ke la membroj aprobu la proponojn por la nova estraro, kaj la membroj estas petataj sendi skriban aprobon aŭ malaprobon ĝis la fino de la jaro (unu monato por Eŭropo — du monatoj por ne-Eŭropanoj, post dato de apero de la gazeto), al oficejo en Leipzig (adreso vidu supre). Rezultaton ni publikigos per cirkulero. Revizoro por tio estos iu membro en Aŭstrio.

8) **Memorigo** ! Oni sendu kiel eble plej rapide la kotizaĵon kaj abonkostojn restantajn al nia Kasisto (adreso vidu numero 3).

Kotizaĵo jara estas 1/2 $ kaj la abono por la gazeto ĉiudumonate aperanta estas 1 $. Tiuj, kiuj havas konton ĉe la Ĉekbanko, pagu per transpagilo al la Sekretario de nia Asocio (adreso vidu supre).

9) **U. E. A.** Aliĝo al ĝi plue okazos ; por la jaro 1912 aliĝo jam estas farita sub la N° 234 (v. nia gazeto, p. 43, 1912). Kotizaĵo estas por tio 2 $.

10) **Membrarlisto** : Starigo de tia Membrarlisto estas grava ne nur por la membroj mem, sed ankaŭ pro propagando. Tial, ni treege petas ĉiujn membrojn respondi aldonitan folieton kaj tuj sendi ĝin al la oficejo en Leipzig (adreso vidu supre). Laŭ alvenontaj respondoj ni faros liston kaj dissendos ĝin al ĉiuj membroj. Ni esperas, ke neniu rifuzos plenumi nian peton.

11) **Enketo** pri la vojaĝoj liberaj malaltigitaj por la fervojistoj kaj iliaj familioj vojaĝante eksterlanden. Oni sendu por tio, ni petas, materialon al la oficejo en Leipzig (adreso vidu supre). Referanton por tio ni jam elektis.

12) **Tradukoj** de regularoj fervojaj : tio estos por ni gravega tasko ; ĉar per tio ni havos plej bonan gajnon por nia profesia tasko, plue ni plivalorigos nian gazeton. Tio ankaŭ estos plej efika propagando inter fervojistaro neesperantista. Ni komencos traduki la tekston de la rondiraj vojaĝbiletoj internaciaj (vidu eksciton de S-ro G-lo Sebert en « Oficiala Gazeto Esp. » N° 3 (47) p. 93, de jaro 1912). Provojn de tiaj tradukoj oni sendu al oficejo en Leipzig (adreso vidu supre).

Pri punktoj de nia protokolo ĉi tie ne tuŝitaj, ni pritraktos en nia 2-a Cirkulero. Por ĝi ni tre volonte akceptos ekscitojn k. t. p.

A. P.

# Kunsidoj de I. A. E. F. en Krakovo.

## UNUA KUNSIDO

### Krakovo, la 13-an de Aŭgusto 1912.

Okaze de la VIII-a Internacia Kongreso Esp. okazis en Komerca Akademio kunsido de *Internacia Asocio de la Esp. Fervojistoj*.

Ĉeestas la personoj, kiuj estas notitaj en la listo de ĉeestantoj.

La sekretario de Asocio (S-ro *Petzold*) malfermas en la nomo de l'Asocio la kunsidon kaj salutas la membrojn alvenintajn kaj la gastojn. Li petas pardonon, ke li ne estas en situacio doni oficialan raporton k. t. p., pro nericevo de la aktoj kaj sekretariaj materialoj ankoraŭ estantaj ĉe la ekssekretario.

Post deklaro, ke la nuna estraro estas formata jene : Prezidanto, S-ro *Schwarz* ; Vicprez., S-ro *Engst* ; Kasisto, S-ro *Bontemps*, kaj Sekretario, S-ro *Petzold*, la subskribinto petas, ke oni ne decidu kaj voĉdonu leĝe. La sekvantaj pritraktadoj tamen ricevu eventuale oficialan aprobon aŭ malaprobon per skriba voĉdonado aŭ ia Komisio estu komisiota labori en senco de esprimitaj deziroj kaj proponoj. Oni konsentas, ke la pritraktadoj estu nur provizoraj kaj ne leĝdonaj.

*A.* — Estas demandite, ĉu nia oficiala bulteno en Parizo « Fervoja Esperantisto » plue aperas. Pro kiaj kaŭzoj la apero de la gazeto ne estas regula ? Kiom ĝi kostas ? Ĉu la nuna prezo povas esti daŭra ?

*B.* — Oni deziras, ke niaj oficialaj dokumentoj kaj notoj estu publikigitaj ne nur en « Fervoja Esperantisto », sed ankaŭ en Ĝeneva gazeto « Esperanto ».

*C.* — La estraro publikigu kasraporton de fondiĝo de nia Asocio ĝis la jaro 1911. Samtempe la Kasisto konigu publike la budĝeton por la jaro 1912, por ke oni antaŭe sciu, en kiu senco kaj por kiaj celoj la mono estas elspezota.

*D.* — Oni starigu liston de tiuj fervojistoj, kiuj volas doni informon pri fervojaj aferoj. Por ke nia Asocio estu konata de ĉiuj Esperantistoj, la listo estu ankaŭ donita al U. E. A. kaj publikigata en Ĝeneva gazeto « Esperanto ».

*E.* — Kelkaj deziras aliĝon de nia Asocio al U. E. A. en formo de entrepreno. La kotizaĵo laŭdire estas 2 $\mathcal{S}$.

*F.* — Sciigoj estas deziritaj pri la Asocio de Germanaj Esperantistoj. Oni ne scias, ĉu la Asocio ankoraŭ ekzistas, ĉu ĝi plue apartenas al I. A. de la E. F. Ĝis nun oni nur scias, ke la « Germana Fervojisto » ne plu ekzistas.

*G.* — Estas kritikite la nesufiĉa funkciado de nia Asocio. La ĉeestantoj deziras, kaj ili havas la volon, ke nia Asocio estu tia, kia oni povas postuli rilate al ordo.

*H.* — La elektado de estraro estas sendecidite priparolita. Eventuale la elektado devas okazi skribe, donante al ĉiuj membroj tian okazon per dissendado de proponoj.

---

# DUA KUNSIDO

## Krakovo, la 14-an de Aŭgusto 1912.

La subskribinto malfermas en Komerca Akademio la kunsidon je 8-a matene; ĉeestas 12 personoj. La nomoj estas notitaj en listo aldonita al protokolo de la Unua Kunsido.

*I.* — Oni provu eldonon de teknika vortaro de fervojaj aferoj. Por plifaciligi la aferon, oni diferencigu la vortaron en : *a*) ĝenerala kaj *b*) speciala parto. Tiamaniere oni esperas havigi en proksima jaro la parton ĝeneralan.

*J.* — La estraro dissendu al ĉiuj membroj la membrarliston.

*K.* — La traktadoj pri la elektado de la estraro estas jenaj :

*a*) La voĉdonado devas esti skriba kaj tiamaniere, ke ĉiuj membroj povu partopreni ;

*b*) Oni starigu liston provizoran por nova estraro : Prez., S-ro *Tarnow* (Charlottenburg) ; Vicprez., mankas ; Kasisto, S-ro *Engst* (Dresden) ; Sekretario, S-ro *Petzold* ;

*c*) Por ke la diversaj nacioj, landoj k. t. p. estu reprezentataj, oni starigu konsilantaron. En konsilantaron oni ankaŭ elektu personojn konsiderante la propagandvidpunkton.

En estonta kunsido, la diskutado pri elektado estos daŭrigata.

La fermo de l' kunsido estas je 9-a h. 1/2.

---

# TRIA KUNSIDO

**Krakovo, la 16-an de Aŭgusto 1912.**

Malfermo je 2-a h. 1/2 ; ĉeestas 6 membroj kaj 1 gasto.

*L.* — La subskribinto legas salutojn senditajn el Francujo.

*M.* — La protokoloj de l' Unua kaj Dua kunsidoj estas legataj kaj poste aprobitaj.

*N.* — S-ro *Szymanowski* (Bromberg) estas proponita kiel vicprezidanto ; membroj de ĝisnuna estraro ne reelektotaj en ĝin, devas esti elektota en konsilantaron. Oni starigu konsilantaron, en kiun oni elektu reprezentantojn de diversaj landoj k. t. p. kaj diversrangaj grupoj.

*O.* — La ĉefkunveno de nia Asocio okazu je loko de Universala Kongreso Esperantista. Estas dezirinde, ke ankaŭ ekster tio okazu kunsidoj ne leĝdonaj. Tiaj kunsidoj estas utilaj por rilatigi inter kolegaro kaj konigi la dezirojn k. t. p. Kolegoj, kiuj volas aranĝi tiajn kunsidojn ne leĝdonajn, estas petataj sendi protokolon pri la traktadoj al la sekretariejo de l'Asocio.

*P.* — La abonafero de « Fervoja Esperantisto » ne estu samtempe afero de nia Asocio. Oni ne intermiksu la kotizaĵon por nia Asocio kun abonkosto por « Fervoja Esperantisto ».

*Q.* — Oni starigu liston de laboroj k. t. p. jam deciditaj, sed ankoraŭ ne finitaj.

*R.* — Membroj de nia Asocio estu mallonge informataj pri plej gravaj aferoj. Tiaj informoj, eble en formo de cirkuleroj, estu dissendotaj kvarfoje en unu jaro. Membroj, kiuj estas abonantoj de « Fervoja Esperantisto », devos ricevi la cirkuleron kun la gazeto ; la aliaj ricevos ĝin kiel presaĵon apartan.

*S.* — S-ro *Felser* (Welsberg en Tirol) faras proponon skriban, ke oni aranĝu enketon pri la liberaj aŭ malkarigitaj vojaĝoj por la fervojistoj mem.

Fino de la kunsido je 3-a h. 3/4 posttagmeze.

ALFRED PETZOLD
Kiel gvidanto de la kunsido kaj kiel Sekretario.
(Leipzig, Königstrasse 4, III.)

# FERVOJISTA PENSIA KASO

La fervojista pensia kaso de la Nederlandaj ŝtataj fervojistoj havis ĝis nun teorian matematikan deficiton. Per nova ŝtata leĝo la pensio depost la 1-a de Januaro 1912 estas regulita, ankaŭ se la ŝtato poste alproprigus la ekspluaton de la fervojoj. Ĝis nun privata kompanio ekspluatas.

La personaro kotizas 3 %, novuloj 4 %, la kompanio 4 % de la salajro. Depageblaj estas salajroj ĝis 6000 guldenoj.

La fervojistoj devas demandi pension je la 65-jara aĝo aŭ je invalideco, kaj ricevos 1/60 po deĵor-jaro, maksimume 40/60, sed ne pli ol 4000 gulde-

noj. Tiu pensio de fr. 4000 koncernas nature nur la altrangulojn. La pensio estas kalkulata per la meza salajro de la 5 lastaj jaroj de la pensio-rajtanta.

Plie la fervojistoj pagas ĉiun monan avanson en kvar jaroj.

Vidvino aŭ laŭleĝaj infanoj ĝis la 18-a jaro ricevos 5/120 + 1/120 po deĵorjaro, maksimume 45/120, sed ne pli ol fr. 1380.

Okaze de edziĝo post la 60-a jaro, la edzino nur povas esti 20 jarojn pli juna ol la edzo por fariĝi eventuale pensio-rajtanta.

Se la aĝa diferenco estus en tiu ĉi okazo inter 10 kaj 20 jaroj, ekzistas specialaj reguloj.

La pensio ekekzistas post 10 deĵor-jaroj ; kiu forlasas la fervojon povos ekhavi sian perlaboritan pension je sia 65-a jaro.

Ne edziĝintaj personoj povas rajtigi sian patrinon (vidvinon) aŭ fratinon sub kelkaj kondiĉoj.

La kompanio invitas la personaron elekti komitaton por eventualaj konsiloj, deziroj, k. t. p.

Pensio estas prokrastita salajro kaj nevendebla, do absolute persona.

BAL, BREDA *(Holando)*.

## RESANIGEJO POR FERVOJISTARO

Apud Nymegen, sur altaĵo en sana regiono, staras la resanigejo de la fervojistoj de tri holandaj kompanioj. La fondaĵo estas posedaĵo de la personaro. La anoj kotizas, laŭ la jara salajro de 700, 1000 kaj pli guldenoj, monatan sumon de fr. 0,12, fr. 0,16 aŭ fr. 0,20. Ili rajtas tri-semajnan flegadon senpagan, se ili fariĝus malsanaj sed ne « enlitkuŝantaj ». Poste ili nur pagas malgrandan sumon.

Ankaŭ la familianoj (edzino, infanoj) estas flegataj se bezone.

Oni luis belegan vilaon, nomatan Villandry ; la kompanioj simpatie helpas la resanigejon, la kotizoj estas ricevataj per la salajr-listoj.

Infektaj malsanuloj ne estas akceptataj en Villandry, sed oni helpas ilin per privataj tuberkulozaj-resanigejoj, k. t. p.

Alilandaj fervojistoj, kiuj iam vizitos Nymegen, povos viziti Villandry ; tamen ili bonvolu skribi antaŭe.

BAL, BREDA *(Holando)*.

## LETERKESTO

— Mi tre dankas S-ron Münzing, prezidanto de la Laborista Stutgarta Esp. Grupo pro lia amika hejma akcepto. Ĉiuspecajn bondezirojn mi faras por lia familio. Mi petegas lin, ke li varbu inter la Stutgartaj samideanoj, al kiuj mi ne estas nekonatulo, fervojistojn por nia Asocio I. A. E. F.

— Al Johano Perriard, ĝenerala Direkcio des Chemins-de-fer Fédéraux, Caisse principale, à Berne : Mi ricevis viajn aliĝon kaj poŝtmandaton (6 fr.) Dankon por via malavareco imitinda.

G. C.

— *Avanson* (Bal), *Ekscitoн* (Petzold), traduki per la taŭga vorto mi ne sukcesis.

G. C.

# FE-RAKONTO

DEDIĈITA AL LA GERMANAJ ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ

Vi estas, karaj legontoj, tute konvinkitaj, certaj, ke ne plu ekzistas sorĉistoj, kiuj ĵetas ĉe bonegaj homaj kreitaĵoj ensorĉojn, kies efikoj daŭras tiel longatempe ĝis kiam sorĉisto bonpovanta kaj pli potenca ne elparolis vorton, kies povo kapablas nuligi la ensorĉon okazigitan de l' ensorĉinto.

Antaŭe, mi opiniis kiel vi, ke tiaj fabeloj-kontoj rakontataj al genepoj por dormigi ilin, estis nur eltrovitaj de l' geavoj dum la maldormoj produktitaj de la krioj de l' infanoj de iliaj filoj.

Nune tute alimaniere mi opinias kaj mi havas bonan motivon por pensi tiele.

Aŭdu ! Mi ĵus eksciis ja, ke pli ol cento da homoj bonsanaj kaj viglaj ekpereas sekve de ensorĉo, kies ĉefa efiko konsistas en la perdo de la memoro rilate al afero kiu pleje plezurigis ilin.

La malfeliĉuloj, pri kiuj mi aŭdis, jam ne plu scias, ke ili estas Esperantistoj, Fervojistoj, iamaj abonintoj al « Germana Fervoja Esperantisto », kaj precipe estontaj abonantoj al la ĉiam ekzistanta « Fervoja Esperantisto ». Tiel granda estas ilia senmoveco, ke oni kredus, ke kiel :

*Der alte Barbarossa,*
*Der Kaiser Friedrich*
*Im unterirdschen Schlosse*
*Hält er verzaubert sich*

ili atendas por reviviĝi, ke la korvoj turniĝantaj super ili malaperu.

Feliĉe estas, ke mi renkontis hodiaŭ ankaŭ sorĉistinon, prakuzinon mian per Adamo kaj Evo, kiun mi iam decege amindumis. Kvankam mi ne edzinigis ŝin, ni havas ĉiam bonajn amikajn interrilatojn kaj ni vidis nin reciproke plezurege, ĉar ni konjugaciis, dum niaj junecaj jaroj, nur la indikativon de la verbo « ami ».

Post la kutimaj salutoj kaj kisoj, mi tuj malfermis mian koron al la amikino ĉiam kara, kiu bonvolis diri al mi, kia sorĉa vorto estas elparolota de l' ensorĉigitoj por vidi la finon de siaj suferoj kaj esti kapablaj rebonigi la malbonon devenintan de la nevola senzorgeco :

**PETZBERCHIL**

Jen la magia vorto, kiu laŭtege elparolata, liberigos vin el la ensorĉo pezanta sur via animo esperantista, kaj ho ! vidu kian miregindaĵon : tuj samtempe vi trovos en via monujo unu spesmilon, kiun senprokraste vi sendos al S-ro George Chilot, administranto kaj kasisto por la ĵurnalo, en Villeneuve-St-Georges, apud Paris.

TOLIHC.

# NI IROS AL STUTGART

La proksima Germana Kongreso Esperantista okazos en Stutgart. Jam ni faras preparojn por povi ĉeesti ĝin multnombre.

Bedaŭrinde estas, ke la I. A. E. F. ne ankoraŭ varbis fervojistojn en la ĉefurbo de Würtembergujo.

Ni esperas, ke ni tre baldaŭ ne povos rajte esprimi tian bedaŭron kaj ke ni aldonos al nia anaro la nomon de Stutgarta esperantista fervojisto.

La proksima gazeto N° 8, aperos antaŭ la fino de l' jaro, je la mezo de Decembro. Do ĉiu sendu artikolojn, sciigojn al Villeneuve-Saint-Georges. Proksiman jaron, se ni havos monon sufiĉan, t. e. sufiĉe da abonantoj, ĝi aperos 11 fojoj.

Centra Presejo Esperantista, V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.
*Le gérant :* A. Berlande.

# DEMANDARO

.................... la .................... 1912.

*A*

1° Ĉu vi volas aliĝi al la Internacia Asocio de l' Esperantistaj Fervojistoj (fondita 7. Sept. 1909) Jarkotizaĵo : 0,500 Sm. ? ..........

2° Ĉu vi volas aboni la oficialan fakgazeton *Fervoja Esperantisto* (dumonate aperinta) Jarabono : 1 Sm. ? ..........

*B*

3° (Nur por kontrolo de niaj listoj) : *a.* Ĉu vi jam estas membro de nia Asocio I. A. E. F. ? .......... *b.* Ĉu vi jam abonis *Fervoja Esperantisto* el Paris ? ..........

4° Ĉu vi akceptas la proponon por elekto de la nova Estraro? ..........

Respondoj per : ***jes*** aŭ ***ne.***

5° Ĉu vi havas proponojn por fari ? kiajn ?

**Petas skribi tre legeble, litero post litero :**

Antaŭ- kaj familio-nomoj ....................

Titolo aŭ profesio ....................

Adreso { loko kaj lando ....................
strato kaj numero .................... }

Bonvolu plenigi la jenan demandaron, kaj ĝin sendi al S-ro Alfred Petzold, sekretario de la I. A. E. F., **4, III, Königstrasse, Leipzig (Germanujo).**